

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 8

AGUSTO, 1946

EPOKO LIBRO N-ro 8

LA VIRINETO EN BLUO

KAJ ALIAJ RAKONTOJ

originale verkitaj en Esperanto
de

MASON STUTTARD

Prezo : 3 ŝilingoj, afranko 3p.
(13 internaciaj respondkuponoj).

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.,

Anglujo

Mendu ĉe

via enlanda libroservo

aŭ ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiuj du vortoj.

Mi interŝanĝos 250 pecojn de Aŭstraliaj postmarkoj (10 ekz. de 25 diversaj markoj) kontraŭ 250 pecoj de vialandaj postmarkoj. Sendu viajn postmarkojn per registrita letero. M. C. McKay, Kennedy Street, BOWEN, Queensland, Aŭstralio.

Mi interŝanĝas prefere flugpoŝtmarkojn el ŝtatoj sudamerikaj. Interŝanĝe vi ricevas svedajn kaj ordinarajn skandinavajn poŝtmarkojn. Inĝeniero Ernst Rendahl, Sturegatan 5, Skövde, Svedujo.

Antikvavaĵoj el Egiptaj tomboj, faraonaj, greko-romanaj, Moslimanaj. Moneroj, manuskriptoj, pentraĵoj. Lunzer, P.O.B. 196, Alexandria, Egiptujo.

Ludoviko Manuel, 69 Rue de la Republique, Drancy (Seine), Francujo volas korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, precipe pri la sindikata movado. Mi tuj respondos. Sendu ĵurnalojn, ilustritajn poŝtkartojn, k.t.p.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Letervesperon ni aranĝas komence de Septembro. Ni garantias respondon al ĉiu sendata saluto. Kolding Esperanto Klub, Hotel Royal, Kolding, Danlando.

Jeko Kir. Obuŝtarov, horloĝisto, urbo Elhovo, Bulgarujo, deziras korespondi pri horloĝisteco, fotografio, filatelo. Interŝanĝas poŝtmarkojn, librojn, revuojn, poŝtkartojn. Certe respondos.

Skoltaĵojn interŝanĝas, korespondas. Pawlowski, Kosciuszki 69, Lodz, Pollando.

Gildo de Sankta Ajdan : Nova eldono de nia senpage broŝureto ĵus aperis. Ni invitas vian intereson pri la kunularo. Gildestro : Roye England (Del. IEL), Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Adresa ŝanĝo. Post la 12a de Aŭgusto 1946 la adreso de nia samideano T. J. Gueritte estos : 39 Lovelace Road, Surbiton, (Surrey), Anglujo.

Poŝtmarkinterŝanĝon deziras Arvid Bengtsson, Kindsboda, Svedujo. Faru sendaĵon kaj vi ricevos samvalorajn svedajn pm.

Intersteno. Imformon deziras Robert J. Milligan, Diplomito, BM/LAPO/180.1., London, W.C.I., Anglujo. (Ankaŭ mi deziras retrovi malnovajn korespondintojn miajn).

Brita oficiro deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

Esperanto-propagandaĵojn ni bezonas por serio da priesperantaj paroladoj. De ĉiuj landoj ni volas ricevi. Nepre rekomencos. Ges-roj Fraser, 2 Lady Helen Street, KIRKCALDY, Fife, Britujo.

Al Esperantistoj ĉiulandaj. La Birminghama Grupo aranĝas leterkunvenon la 21an Septembron. Bonvolu skribi leterojn aŭ poŝtkartojn al F-ino Sawyer, 50 Park Hill, Birmingham 13, Anglujo. Garanti respondon.

Dankon pro la leteroj kiujn mi ricevis el multaj landoj sekve de mia anonceto en ĉi tiu gazeto pri la planata tutmonda Kristana gazeto. Dio grace konduku la aferon ĝis feliĉa fino laŭ Lia volo ! Ni preĝu ke tiel okazu ! Redaktoro Martti Putaala, Puutarhakatu 17, Oulu, Finnlando.

Direktoro de laktejo deziras korespondi kun samfakuloj el Nederlando, Danujo, Svedujo, Belgujo, kaj Finnlando. Respondos certe. Václav Zelezny, laktejo, Doksy u Máchova jezera, Ĉeĥoslovakujo.

Samideanoj deziras trovi korespondantojn en tuta mondo, kiuj ŝatus korespondi pri farmaceŭtikaj aferoj. Certe respondos. Ph. Mr. Blazena Köhlerová, apoteko, Doksy u Máchova jezera, Ĉeĥoslovakujo.

Ilustritajn kartojn el la tuta mondo kolektas kaj al ĉiu sendos Václav Haslar, ŝparkaso, Doksy u Máchova jezera, Ĉeĥoslovakujo.

La Nova Kristanismo, bazita je la doktrino de sveda scienculo kaj reformatoro Em. Swedenborg, enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas J. B. Vlach, Luzická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

Ĉina Esperantista Filatelisto deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj en tuta mondo. S-ro Julin Huang, P.O. Box 48, Kunming, Ĉinujo.

Angla instruistino volas korespondi kun geinstruistoj en ĉiuj landoj pri edukado kaj generalaj temoj, kaj interŝanĝi bildojn k.t.p. por siaj lernantoj. S-ino B. M. Delgado, Ratcliffe Culey, ATHERSTONE, Warwick., Anglujo.

Skoltoj ! Skribu al S-ro Philippe, 8 Rue Pasteur, Arras, Francujo.



ĜUTO MALGRANDA KONSTANTE FRAPANTE

Jam en la unua avizo pri la Petskribo, ni permesis al ni esprimi esperon, ke tiu tutmonda alvoko havos rezultatojn ekster kaj komplemente al la tuja kaj alcelata rezulto, atentigi al UNO pri la ekzisto de Esperanto kaj postuli oficialan agnoskon de tiu lingvo. Unu grava sekvo, kiun ni antaŭvidis, jam efektiviĝis. La propagando por Esperanto ĉe la granda publiko estas konstatita fakto. Ĉiuj niaj kunlaborantaj organizaĵoj raportas pri la senprecedencaj interesiĝo kaj entuziasmo kiuj estas stimulitaj de nia komuna agado. Neniam antaŭe la Esperanto-movado faris tiel bonan rikolton. Ne estas hazardo, ke kontrolo Gallup en Francujo, ke opinio-kontrolo fare de radio-stacio en Belgujo, kaj aliaj indikoj ĉie, montras per grandaj plimultoj la favoron de la homoj al Esperanto inter ĉiuj eblaj solvoj proponataj por la lingva problemo.

En Islando la sukceso de la Petskribo estas unika: 3% de la tuta enloĝantaro (do efektive tio nepre devas reprezenti multe pli altan procenton de la plenaĝularo) subskribis. Ĝuste de tiu lando ni ĝojas raporti gravan novaĵon. Ni citas el letero, kiun ni ricevis de Esperantista Societo *Aŭroro* :

“Kiam la kolektado estis en plena funkcio, la anoj de la Islanda parlamento diskutis pri la sistemo de instruado en Islando. Okaze de tio, du parlamentanoj de la malsupra ĉambro projektis, ke Esperanto estiĝu deviga instrufako en la gimnazioj. La projekto ja estis malakceptata, sed tamen estis malgranda diferenco de voĉoj. Ĝi ricevis 9 voĉojn, sed kontraŭ estis 11. La du parlamentanoj tute ne havis ian kontakton kun ni pri ĉi tiu afero. Tamen ŝajnas, ke la projekto estis sekvo de la subskribo-kolekto, ĉar ĉiuj parlamentanoj ricevis la rilatajn foliojn.”

Tiu sukceso instigis la Islandajn samideanojn skribi al la Ministro por Edukado pri enkondukado de Esperanto en lernejoj ĝenerale kaj el la respondo ricevita, ni citas la jenon :

“La instrufakon de la lernejoj decidas la parlamento per leĝoj. Tial la Ministerio ne rajtas plenumi vian proponon. Cetere la Ministerio volus projekti al parlamento ke Esperanto estiĝu tie ĉi deviga instrufako, se la proksimaj landoj faros la lingvon deviga instrufako ĉe si.”

* * *

Dum Junio en Londono kunsidis la Komitato de Prepara Komisiono de UNESCO (Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UNO). La problemo de lingvoj estis diskutata kaj eminenta samideano nia en la Komitato sugestis

la uzadon de Esperanto kaj aludis la Raporton pri Esperanto eldonitan de la Ligo de Nacioj en 1922. La Komitato konsentis, ke UNESKO faru enketon pri la ebleco uzi tian lingvon kaj ke tio estu konsiderata de la Prepara Komisiono.

Ni legis lastatempe en iu Esperanto-gazeto, ke petskribo al UNO nepre devas esti vana afero. Ni memoras, ke Ezopo verkis fabelon pri vulpo kiu, ne povante mem atingi la belajn fruktojn, nomis ilin acidaj . . . M.S.

La Petskribo-ciferoj Kontrolitaj ĝis 6a de Julio

Landoj

Aŭstralio ..	956	Kanado ..	150
Aŭstrujo ..	46	Kenjo ..	5
Belgujo ..	2190	Kongo ..	4
Brazilo ..	2036	Luksemburgo	31
Britujo ..	9420	Maroko ..	922
Bulgarujo ..	14973	Nederlando ..	4262
Cejlono ..	1	Nederlandindio	1
Ĉeĥoslovakujo	2389	Norvegujo ..	8115
Danujo ..	3777	Nov-Zelando	1053
Egiptujo ..	1242	Palestino ..	115
Etiopio ..	1	Polujo ..	9
Finnujo ..	4727	Portoriko ..	1
Francaujo ..	1950	Portugalujo ..	2913
Germanujo ..	143	Rodezio ..	6
Grekujo ..	473	Sieraleono ..	6
Hindujo ..	46	Sud-Afriko ..	46
Hispanujo ..	1	Svedujo ..	1
Hungarujo ..	1528	Svisujo ..	910
Irako ..	3	Usono ..	1779
Islando ..	3775		
Italujo ..	9	sumo ..	70015

Okupoj

Artistoj ..	470	Navigaciistoj	359
Delegitoj		Parlamentanoj	21
Komunumaj	81	Policistoj ..	317
Dentistoj ..	92	Presistoj ..	655
Desegnistoj ..	438	P.T.T.-istoj ..	1496
Dommastrinoj	10028	Religiistoj ..	235
Edukaj		Sciencistoj ..	285
Aŭtoritatuloj	167	Sindikatĉefoj	87
Elektristoj ..	436	Soldatoj ..	874
Farmacistoj	212	Studentoj ..	6557
Farmistoj ..	3375	Ŝoforoj ..	547
Hotelistoj ..	253	Ŝtatoficistoj ..	1721
Inĝenieroj ..	2335	Teksistoj ..	199
Instruistoj ..	3814	Transportistoj	3773
Juristoj ..	396	Urboficistoj ..	389
Ĵurnalistoj ..	292	Vendistoj ..	1609
Komercistoj ..	13010	Vestistoj ..	962
Konstruistoj	960	Diversaj ..	3738
Kuracistoj ..	909		
Laboristoj ..	4251	sumo ..	70015
Lingvistoj ..	77		
Meiistoj		ĝis 26a de Julio :	
Diversaj ..	4595		95000

PRAKTIKA PROPAGANDO

Volante servi per Esperanto al la homaro, ni devas klopodi pli energie enkonduki ĝian praktikan uzon.

Certe ekzistas seriozaj amikoj de Esperanto, eĉ fervoraj Esperantistoj, kiuj vikle uzas la lingvon en Esperantaj societoj, partoprenas kongresojn k.t.p. sed malgraŭ ke ili okupas gravan postenon, kie ili povus iniciati ke la oficejo, entrepreno, komercejo, instituto skribu al eksterlando en Esperanto, ili eĉ ne pensas pri tiagrada uzado de Esperanto.

Sed oni devas komenci! Ni ne restu ĉiam nur inter ni. Kelkaj provoj pruvigis, ke la eksterlandano, ĉu privatulo, ĉu instituto, entrepreno k.t.p., respondas al Esperanta letero. Eble oni respondas en nacia lingvo, tamen, oni respondas. Ili hazardede havas iun kiu scias la lingvon, aŭ serĉas delegiton, societon, kiu tradukas. Tio okazis en Hungarujo. Ekzemple la Turisma Oficejo, ricevinte skribaĵojn en Esperanto—kaj ankaŭ aliaj institutoj—ne forĵetis ilin, sed tradukigis kaj respondis, komence en iu nacia lingvo, poste kiam ili ricevis pli multajn, en Esperanto. Iu ĉefoficisto eĉ lernis la lingvon kaj oni presigis similtastajn leterojn por povi respondi. Certe ankaŭ alilandaj ŝtataj oficejoj, komercejoj kaj bankoj ĝentile respondus al Esperantaj leteroj kaj spertinte, ke tio estas pli simpla ol korespondadi en aliaj lingvoj, iom post iom mem ankaŭ respondus en Esperanto.

P. Balkányi, Hungarujo

KONTRASTOJ

Jen junulino, pri kies beleco Ĉiu drinkulo, laŭ sia mokdeco, Kaj ĉiu soldato post ĉiu batalo, Tostas avide el plena pokalo ; Al kiu riĉulo kaj princo kaj reĝo Kaj ĉiu junulo sen saĝo aŭ leĝo Celas alplaĉi per ĉia juvelo Aŭ verŝo de sango en brua duelo. Ja bela ŝi estas, ĉi tiu virino ; Sur vango kaj lipo jen hel-karmezino ; Kaj kiel la nokto pro foraj stelaroj, Nigre briletas okuloj kaj haroj. Sed ŝin mi figuras velkintan pro aĝo : Amara megero kun ĉia domaĝo : Soleca, senama, malriĉa inaĉo, Kiun konintoj salutas per kraĉo. Do vin, amatinon, mi ĝoje revenas Kaj kontraŭ la koro dankeme vin tenas ; Ĉar viaj okuloj briladas pro amo, Felicho sufiĉas al vi por ornamo. Honeste kaj simple vi tage laboras Kaj kiu ekkonas vin, tiu adoras. Ĉiam pli dolĉa, kaj ĉiam pli bela, Vi restas, por mi, anĝelino ĉiela.

Brendon Clark, Nov-Zelando

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

BELGUJO

Okazis dum Pentekosto la 11a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista en Brugge. Regis granda entuziasmo kaj multe da intereso estis vekita ĉe la publiko.

Dum la kongreso oni anoncis la gravan novaĵon, ke la Nacia Radio-Instituto decidis, ke ek de Oktobro okazu regulaj disaŭdigoj favoraj al Esperanto. Dum ĉiu sabata posttagmezo, propaganda parolado en nederlanda lingvo preparos la terenon por la elementa radio-kurso, kiu komenciĝos la unuan sabaton de Novembro.

Libera Radio-Tribuno de la Belga Nacia Radio-Disaŭdigo faris enketon pri la demando: *Kion vi opinias pri la neceso de lingvo internacia?* Jen iuj rezultoj:

Favore	87.5%
Kontraŭ	12.5%

La favoraj opinioj estas subdivideblaj jene:

Por Esperanto	51.25%
Sen prefero	27.50%
Por Angla	6.87%
Por Latina	1.25%
Por Franca	0.62%

el Flandra Esperantisto

ĈEĤOSLOVAKUJO

Blinduloj: Kunvenoj por reorganizi la movadon en ĈSR. okazis la 16an de Februaro, 3an de Marto kaj 2an de Aprilo. Krom la laborkunsidoj, la programo konsistis el muzikado, paroladoj kaj poezideklamado. Ĝis nun aliĝis 27 kunlaborantoj el Praha kaj provincoj, ankaŭ el Slovakujo. La preparan komitaton prezidis S-ino Josefa Blažková, lingvo-instruistino. La unua numero de la brajle presita organo *Aŭroro*, dua periodo, aperis en Aprilo. Ĝin redaktas S-ro Vuk Echntr. Instruado al blinduloj okazas en la Instituto de Deyl sub gvidado de S-ino Blažková. Adreso: Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj, Soudní ul. 739, Praha XIV. Oficiala organo *Aŭroro*.

V.E.

GERMANUJO

Al la grupo en Munĥen ĝis nun aliĝis 500 membroj kaj en multaj aliaj urboj de Bavarujo fondiĝis Esperantaj grupoj, kaj la movado estas tre vigla.

Precipe en Munĥen oni atingis sukcesojn. Oni jam kelkfoje disaŭdigis por-Esperantajn paroladojn pere de Radio Munĥen, kaj la sudgermana gazetaro regule publikigas novaĵojn el Esperantujo.

Grave estas, ke oni sukcesis akceptigi ĉe Universitato Munĥen Esperanton, kaj la 31an de Majo komenciĝis la unua kurso por la studentaro. Tiu universitato estas la unua germana kiu akceptis nian lingvon.

En la sama urbo la popolaltlernejo starigis kurson de Esperanto, kaj kurso por geinstruistoj funkcias jam de du monatoj. Post la fino de tiu kurso Esperanto estos instruata en la popollernejoj. Entute en Munĥen nun funkcias 15 kursoj kun partopreno de 300 personoj.

Gravaj malfacilaĵoj malhelpas nian laboron. La naciistoj detruis ĉiujn Esperantajn lernolibrojn kaj vortarojn. Oni provas forigi la malpermeson uzi Esperanton en korespondado kun eksterlando.

D-ro S. Ziegler

HUNGARUJO

La Hungara Esperantista Societo (HES) okazigis sian jarkunvenon la 26an de Majo en oficejo de la Parlamenta Domo en Budapeŝt.

Oni raportis, interalie, ke tri kursoj por ministerianoj kaj oficistoj nun funkcias. Oni celas krei fortan favoran opinion pri Esperanto en ministeriaj rondoj por poste fari proponon pri enkonduko de Esperanto, kondiĉe ke sufiĉe da aliaj ŝtatoj kunlaboru.

Oni ankaŭ faris decidon, ke tuj kiam tio estos ebla, HES aliĝos al IEL.

La 3an de Junio okazis grava kunveno en la Parlamenta Domo pri enkonduko de Esperanto en lernejojn. La kunsidon aranĝis Sindikato de Pedagogoj kaj la Grupo de Esperanto-Amikoj de Parlament-representantoj. Partoprenis scienculoj, politikistoj, kaj reprezentantoj de ministerioj. Oni decidis sendi proponon ke Esperanto estu instruata laŭpove kiel deviga temo en lernejoj. La radio kaj gazetoj raportis pri la afero.

Du gravaj gazetoj regule raportas pri Esperanto. Estus utile se eksterlandanoj skribus dankleterojn kaj petus informon pri Hungarujo, aldonante respondkuponon. Jen la adresoj: *Világ*, Budapeŝt, Rákócsi ut 54; *Haladás*, Budapeŝt, Gresham, palota.

P.B. kaj N.V.

JAPANUJO

Feliĉe nia oficeja domo kaj propra havaĵo restis sendifekta kun valora biblioteko kaj tuta stoko da eldonaĵoj. Nia afero, malgraŭ sufokej cirkonstancoj, neniam ripozis dum la milito. Nia monata organo aperis akurate ĝis marto de pasinta jaro kiam la registaro "konsilis" nin ĉesigi ĝian eldonadon. Krome ni sukcesis eldoni, interalie, ampleksan studon de K. Ossaka, *Malgranda Monografio de Esperantaj Prepozicioj* (ĉ. 500 p.) en 1943. Sistemaj kursoj estis organizitaj konstante.

Tuj post la milito ni faris viglan ekpaŝon por la movado. En Oktobro ni komencis reeldonadon de *La Revuo Orienta* kaj 16an de Decembro ni havis nian 32an Kongreson en Tokio, kun partopreno de 71 membroj. En multaj kolegioj kaj universitatoj oni organizas Esperanto-kursojn kun ĉeesto de 50 ĝis 200 studentoj.

La Socidemokrata Partio de Japanujo metis paragrafon koncernantan al Esperanto en siaj politikoj. Nome sub paragrafo 11 en ĝia politiko pri kulturo, oni legas: *Enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo*. En la inaŭgura kunveno de la partio, S-ro Ono-Syuniti, ĝia centra komitatano, raportis en sia klarigo pri la nomo de la partio, ke ĝi estos nomata per Esperanto en internaciaj rilatoj, kaj aldonis ke la partio uzos Esperanton por kontakti la popolojn de la mondo.

Instituto Por Paco Porĉiama establita tuj post la milito decidis sub iniciato de markizo Tokugawa uzi paralele Esperanton kaj anglan lingvon por publikigi siajn raportojn eksterlande. La Instituto organizis kurson de Esperanto por siaj membroj kaj oficistoj sub gvido de S-ro Oŝima-Joŝio, sendita de nia instituto.

Japana Esperanto-Instituto

NEDERLANDO

Nederlanda Centra Komitato Esperantista (N.C.K.E.) organizas grandan Esperanto-Kongreson en Utrecht la 7an de Septembro 1946. Oni esperas, ke tio estos amaskunveno kiel tiu en Hago en 1938. Kvar prelegistoj parolos sed oni klopodas, ke alestu ankaŭ eksterlandano, kiu alparolu la kongreson Esperantlingve.

Ni deziras, ke la kongreso estu impona manifestacio de niaj deziroj kaj espero. Eksterlandanoj tial sendu salutleterojn kaj simpatiesprimojn al la Sekretarioj: S-ro A. Leideritz, Vechtstr. 5-2, Amsterdam-Z, aŭ al la kongresejo N. V. Huis, Oude Gracht 245, Utrecht, Nederlando.

P.B.

POLUJO

La 9an ĝis 10a de Junio okazis en Łódź Tutpollanda Esperanto-Kongreso. La Urbestro faris oficialan akcepton kaj ĉeestis pluraj eminentuloj, inter kiuj troviĝis rektoro de Universitato Łódź—Prof. Kotarbinska—kaj dekanano de la farmacia fakultato en tiu urbo, Prof. Muszynski. Tiu lasta faris raporton pri *Historio de lingvo internacia*.

Interesa estis propaganda kunveno apud la surmura tabulo starigita en 1937 honore al la memoro de L. L. Zamenhof ĉe angulo de Zamenhof-strato.

Dum la kongreso okazis speciala kunsido de IEL-anoj kaj simpatiantoj en kiu parolis la ĉefdelegito R. Sakowicz.

La demando pri aliĝo de la Asocio de Polaj Esperantistoj al internacia asocio estis vigle diskutata, sed solvon oni ne atingis kaj lasis decidon al la Estraro en Krakovo.

Jen G.S.A.! Libreto N-ro 2 de la Gildo de Sankta Ajdan. Interesa propagandilo kun du fotografajoj de faritaj reproduktajoj. Vidu anonceton.

ĈENLETEROJ

En la jaroj antaŭ la milito, multaj eminentaj kaj aliaj samideanoj estis ĝenataj de tro fervoraj, sed neprudentaj Esperantistoj, kiuj volis propagandi siajn manietojn.

Ĉiuj movadoj idealistaj havas siajn afliktojn, kaj kun la reiro al stato pli malpli normala, oni povas atendi ke reaperos tiuj kuriozaj homoj kies agado iafaje amuzas, sed plej ofte ĉagrenas nin.

Jam sin anoncis la ĉenletera maniulo. Supozeble ekzistas homoj, kiuj ricevas kontenton el tio, sed Esperantistoj ĝenerale ne estas inklinaj sin okupi pri tiaj bagatelaĵoj. Ke oni povis elekti nomojn kaj adresojn el la Jarlibro kaj gazetoj por praktiki tiun ĝenajon kaj sin trudi al homoj nekonataj de la sendanto estis ne nur trouzo de la servoj de la organizaĵoj, sed impertinentaĵo.

Estas tre espereble, ke niaj membroj scias taksu la valoron de praktika servo, kaj ne misuzos ĝin por trivialaj celoj. Cetere la plej bona rimedo por haltigi la iradon de tiaj leteroj, estas ilin enpaperkorgibi.

KATIDO EN PARADIZO

Anglalingva originalo de CICELY HAMILTON

Vivis iam en treege aĉa strato unu tute aĉa viro, pliguste tie li vivis, kiam li ne estis en la malliberejo, kien tre ofte li iris, kaj meritis iri multe pli ofte. En la malliberejo lin subtenis la impostpagantoj, kaj ekstere li subtenis sin mem, alproprigante al si posedaĵojn nesiajn; fakte li ŝtelis tiom kaj tiel ofte, ke se li ne malŝparus la rikoltaĵon per drinkado, li povus esti sufiĉe riĉa.

Okazis iun tagon, ke revenante el najbara drinkejo li apogis sin kontraŭ lanternfoston, atendante ĝis la strato iomete plifirmigos; kaj starante kun la brakoj ĉirkaŭ la fosto, li aŭdis plendan voĉeton ĉe siaj piedoj. Tio estis la helpopeto de katideto, perdita kaj malsata; malpura katideto, tre juna kaj malsperta, alie ĝi ne petus helpon de iu tiel malmulte alloga, kiel la ebria aĉa ŝtelisto. La ŝtelisto tiumomente troviĝis en la stulte gaja etapo de ebrico kaj tial la plenda voĉeto de la katideto amuzis lin.

"Halo," li diris, "kaj kial vi devas plendi? Havas soifon, ĉu? Kaj ĉiuj drinkejoj fermitaj, ĉu? Aŭ ĉu eble oni forĵetis vin el via drinkejo, kiel oni faris je mi pasintan nokton?" La ideo tiom amuzis lin, ke li eklevis la katidon kaj enŝovis ĝin en sian malpuran poŝon; kaj survoje hejmen, ekvidante laktobotelon sur la sojlo de najbaro, li eklevis ankaŭ tiun kaj kunportis ĝin al sia loĝejo.

"Jen vi," li diris al la katido, "ekprovu guton de tio por ĉesigi vian miaŭaĉon—regalas vin la najbarinfanojn." Poste ekŝidante sur la liton, li ridaĉis per stulte ebria maniero, dum la katido lekis kaj lekadis la laktan, kvazaŭ ĝi ne intencus halti. Kaj en la menso de tiu katido, tiu malpura ebrulaĉo, kun sia stulta ridaĉo, estis mesaĝulo de senfina kompto.

Tamen, hazarde, la infanoj kies lakto ŝteliĝis, estis observintaj la ŝteliston forŝanceliĝantan kun ilia lakto; kaj antaŭ ol la katido povis fini sian manĝon, alvenis policano kun la patro de la infanoj. Tiel, rezulte de regalo al katido per trinko, la aĉa viro aperis denove en policjuĝejo; kaj ĉar liaj antaŭaj kulpigoj estis multnombraj, kaj ĉar li estis serĉata rilate unu-du aliajn aferojn, li denove trafis en karceron je la kosto de la impostpagantoj... Kaj tie li amare pripensis la kaŭzon de sia lasta malfeliĉo. "Jen mi", li diris, "jen mi en ĉi tiu malbenita karceron, kaj ĉio pro tiu malbenita katido. Mi lernigos al ĝi veni al mi miaŭaĉi por trinko. Se ĝi ĉeestos kiam mi reelvenos el ĉi tie, mi sendos ĝin naĝi kun ŝtono ĉirkaŭ la kolo."

Sed kiam li elvenis, li ne vidis iun katidon ĉar, kvankam li ne tion sciis, la katido estis mortinta jam delonge. Kiam ĝia mesaĝulo de senfina kompto foriris kun la policano, ĝi atendis kaj esperis lian revenon. Kaj kiam li ne revenis, kaj jam ne estis lakto, ĝi foriris sur la straton por lin serĉi. Kaj dum ĝi ĉirkaŭvagadis, krietante por la mesaĝulo de kompto, alvenis motorĉaro de preter la stratangulo, kaj tio estis la fino de la malpura katideto—krom tio, ke stratpurigisto balais ĝian kadavreton for de la kanaletoj. Ĝi mortis nebedaŭrata de iu ajn vivestaĵo; kaj tre baldaŭ la ebria ŝtelisto forgesis, ke ĝi iam ekzistis.

Tamen, alvenis ankaŭ la tempo de la ebria ŝtelisto. Li mortis, kiel la katido, tre subite, sekve de kverelo en drinkejo. Kaj kiel ankaŭ la katido, li mortis nebedaŭrata de iu ajn vivanto. Kaj lia malbela, nigra animaĉo, forlasinte sian korpon, vojiris ĝis la pordego kondukanta al la Paradizo kaj ekstaris antaŭ Petro, en kies mano restas la ŝlosilo de la pordego.

Nu, kelkaj el ni kredas, ke estas malfacilege eniri la Ĉielon; sed la vero estas, ke estas tute alie. Male, estas malfacilege resti for de la Ĉielo: ĉar Petro la Apostolo, en kies mano restas la ŝlosilo, memoras, ke sur la Tero li estis mensogulo kaj timulo, kiu malkonfesis sian Majstron je Lia bezono. Tial li kompatas eĉ la plej malbonan pekulon, ĉar li mem estis bezoninta multan kompaton kaj ricevis ĝin. Ankaŭ ĉe la dekstra flanko de Petro staras la plej sankta el ĉiuj anĝeloj, kies okuloj estas tiel puraj, ke ili ne povas vidi malbonon kaj pekon.

Ekzistas ununura kialo, pro kiu animo de pekulo estas elbarata el la Paradizo, kaj tiu kialo estas, se neniu en la Paradizo bezonas lin. Estas rajtoj de la beatuloj havi plenecon de ĝojo—kaj kiel povus la beatuloj havi plenecon de ĝojo, se iliaj amatoj restus en turmento?... Tial okazas, ke tre malmultaj animoj estas elbarataj el la Ĉielo; kaj la plej nigra el pekuloj ekĝenuas antaŭ Petro, certe venos voko de bonveno de preter la pordego—kaj Petro turnas sian grandan ŝlosilon.

Kiel ĉiu alia animo, ankaŭ la animo de la ebria ŝtelisto venis genui antaŭ la juĝejo de Petro. Kaj kiam Petro ekvidis ĝian nigrecon, li eklevis la manon por peti silenton en Ĉielo, ĉar li sciis, ke pekulo tiom malpura kaj abomena povos eniri, nur se alia animo amas kaj bezonas lin. Tial la Arego de la Ĉielo ĉesigis siajn

laŭdkantojn, aŭskultante kaj atendante la vokon—kiu ne sonis.

Kaj kiam ĝi ne sonis, la plej sankta el la Anĝeloj vualis sian vizaĝon pro kompatato; kaj Petro, vane atendinte, diris, "Vi ne povas eniri, ĉar neniu en Ĉielo bezonas vin."

Sed ĝuste kiam li parolis, la plej sankta el la Anĝeloj eklevis la kapon kaj diris: "Aŭskultu!" kaj kiam Petro aŭskultis, jen li aŭdis malfortan voĉeton. Je tio, la nigra animo, ekrigardante el sia profunda malespero, vidis, ke la ŝlosilo turniĝas, la pordego malfermiĝis kaj—jen sur la sojlo staras katido . . . Por la katido, la nigra animo, abomena pro sennombraj pekoj, estis pli brilega kaj glora ol la Brilulolo, kiuj rigardas la sanktan vizaĝon de la Patro. Ĝi amis la anĝeletojn, siajn ludkamaradojn en la Paradizo, sed la Nigra Animo estis savinta ĝin je la nokto de ĝia malsato kaj malespero. Tial, kiam ĝi aŭskultadis la anĝeletojn babiloj pri la senfina kompatato de Dio, ĝiaj okuloj fariĝis rondaj kaj saĝaj, kaj ĝi pensadis: "Mi scias ĉion ĉi," kaj ĝi imagis la Sinjoron de Senfina Kompatato laŭ simileco de ebria ŝtelisto.

Tiam Petro diris: "Vi povas eniri, ĉar unu el la beatuloj bezonas vin." Sed la Nigra Animo retiriĝis de la pordego kaj kovris la vizaĝon pro honto memorante, kiel en karceroj li intencis dronigi la katidon kun ŝtono ĉirkaŭ la kolo. Tial li ekkriis: "Ne, ne, mi ne estas inda," kaj turnis sin al la Loko de Malhelego. La plej sankta el la Anĝeloj, kies okuloj estas tiom puraj, ke ili ne povas vidi pekon, baris la vojon al la Malhelego per siaj flugiloj; kaj li diris la volon de la Senfina Kompatato al la Animo, kiu konis sin malinda. "Ĝis vi alvenis, Ĉielo ne estis. Ĉielo por unu el la infanoj de Dio. Sen vi ĝi ne povas koni la plenecon de ĝojo; la Sinjoro bezonas vin por gajigi la koron de Sia katido."

Kaj denove Petro diris: "Eniru"; kaj tiufoje la Nigra Animo alproksimiĝis. La katido ekĝoĝiĝis kaj estis treege gaja; kaj ĝi marŝis antaŭ Petron kun la vosto rekte levita kaj zumadis. Kaj ĝi vokis al la anĝeletoj; "Rigardu, kiu alvenas, rigardu, do, kiu venas," tre fiere, dum la Anĝeloj klinis sin profunde antaŭ la preterpasanta katido, ĉar ĝi savis vivan animon. Sed la katido kredis, ke ili riverencas la viron, kiu similas la Sinjoron. Kaj la Nigra Animo sekvis tra la pordego surgenue.

Kaj la Aregoj de la Ĉielo, kiel ankaŭ la katido, ĝojis kaj estis treege gajaj.

*Kun afabla permeso de la aŭtorino
tradukis E. Lunzer, Egiptujo*

PRUVO

Amerika verkisto kaj poeto Nathaniel Hawthorne funkciis ankaŭ kelkan tempon kiel ĉefkonsulo de Usono en la Norvega urbo Bergen. Unu tagon venis en la konsulejon deksejara knabo asertanta ke li estas Usonano, kaj petis, ke oni transveturigu lin senpage en sian patrujon. Al la konsuleja sekretario ĉi tiu knabo rakontis longan historieton pri tio, kiel li venis Eŭropon. La rakonto ŝajnis tiel aventura, ke la sekretario ne volis kredi al li. Li tial rifuzis la peton de la knabo dirante, ke tio estas nur motivo senpage transiri la maron. Sed la knabo kun larmoj en okuloj certigis, ke li ne posedas dokumentojn sed ĉio kion li rakontis estas vera, kaj insistis petis ke li estu kondukata antaŭ sinjoron konsulon.

Post kelka hezito la sekretario plenumis lian peton. La ĉefkonsulo atente rigardis la palan vizaĝon de la knabo kaj komencis esplori: "Vi asertas, ke vi estas Usonano. El kiu ŝtato?" "El Massachusetts." "Kaj el kiu urbo?" "El Salem."

Post elparolo de tiu ĉi nomo la konsulo iom enpensiĝis. Li ja pasigis en Salem kelke da jaroj dum sia infanaĝo. Li denove ekrigardis akre la knabon kaj subite demandis: "En kies ĝardenon vi iradis kun viaj kamaradoj por ŝtelrikolti la plej bongustajn pomojn?" "En la ĝardeno de maljuna Folsen!" konfidis la knabo kaj iom ruĝiĝis.

La konsulo ekridetis kaj turninte sin al sia sekretario li diris, "Vi povas skribi pasporton al li. Ĉio estas en ordo. La knabo iradis ŝtelrikolti pomojn en la saman ĝardenon kiel mi, kiam mi estis deksejara. Feliĉan vojaĝon, knabo, kaj salutu Salem de mi!"

Trad. F. Petřík, Ĉeĥoslovakujo

INSTRUISTOJ

Grupo Esperantista Edukistara (G.E.E.) organizas du somerajn Esperantajn lernejojn en Francujo.

(1) En Montreuil-Belfroy (apud Angers) de la 4a ĝis 25a de Aŭgusto;

(2) En Sassenage (apud Grenoble) de la 21a de Aŭgusto ĝis la 18a de Septembro.

Estos akceptataj senpage dum unu semajno kelkaj eksterlandaj gekamaradoj. Oni sin turnu al: H. Micard, instruisto, Epineux-le-Seguin, par Laval-Annexe (Mayenne), Francujo.

ĈU NI BEZONAS SCIENCAN REVUON?

En Januara numero S-ro R. Filliâtre skribis pri la estonteco de niaj fakmovadoj kaj prave akcentis la fakton, ke en nia gazetaro regas neunuco kaj efemereco. Se en la estonteco ni volos sukcesoj, ni devos preferi unuecon al neunuco, kvaliton al kvanto. *Interligilo* jam aperis, kaj espereble baldaŭ aperos *Literatura Mondo*, fama revuo por literaturo kaj arto. Ĉu ankaŭ ia scienca revuo estas preparata kaj aperonta? Ĉu reviviĝos *Bulteno* de Internacia Scienca Asocio Esperantista? Mi opinias, ke ia Scienca Revuo ne estus vana laboro kaj ke oni povus kalkuli je sukceso. Parolas por tio jenaj faktoj:

Dum la milito multaj scienculoj estis izolitaj, nun ili klopodas pri informoj el siaj faktoj.

La plejparto de scienca literaturo estas skribata en lingvoj angla, franca, germana, rusa, itala—estas do tre ĝena devo por ĉiu scienculo ellerni minimume tiujn ĉi lingvojn. Ĝis nun ĉiu scienculo, precipe tiu, kiu apartenas al malgranda nacio, devas fariĝi poligloto.

La postmilita mondo bezonas reciprokan konon, science bazitan. Tute libera interŝanĝo de pensoj kaj sciencaj rezultoj estas nun absolute nediskutebla bezono. Ekzemple socia esploro devas okazi sur ĉi tiu scienca kaj monda bazo. Ankaŭ la esploro pri la homa laboro kaj ĝia valorigo estas nepre urĝa postulo de tutmonda justeco. Objektiva informado el internacia vidpunkto estas ankaŭ postulo de fina pacigo nacia.

La postmilita rekonstruo ne estas nur problemo ekonomia, ĝi estas vere ankaŭ problemo morala. Ĉu la filozofoj ne multe pripensas la necesan renovigon kaj resanigon de la homo?

Mia mallonga artikolo estas intencata kiel alvoko al ĉiuj scienculoj kaj kleruloj inter niaj gesamideanoj. Mi petas, ke ili eklaboru en siaj faktoj por frua realigo de estonta Internacia Scienca Revuo. Mi volas sciigi, ke en Praha laboras Akademio Esperanto-Klubo, kiu kunigas kelkajn universitatanojn, studentajn natursciencojn, filozofion, juron kaj ekonomion en forta konvinko, ke la tutmonda paco povas esti sekvo nur de pacienca kaj scienca laboro.

Esperanto povas fariĝi taŭga lingvo por scienca interrilato. Ni opinias ke estas nia tasko helpi la tutmondan sciencan esploron per fidinda objektiva kaj rapida informado pri ĉiuj gravaj sciencaj kaj filozofiaj okazintaĵoj. Tio povus fariĝi plej facile per aperigado de regula revuo, kiu portus artikolojn pri scienco pura kaj aplikita, precipe pri filozofio kaj sociaj

problemoj, kaj informoj el la scienca mondo kun recenzoj de novaj libroj. Ni petas, ke ĉiuj interesatoj sin turnu al ni kun proponoj, sugestoj, konsiloj. Kompreneble, se aperos dume alia revuo, ni volonte kunlaboros ĉar ni ne estas fondemaj.

*Jaroslav Hanus, Akademio Esperanto-Klubo,
Kladno 1997, Ĉeĥoslovakujo*

KOMUNAJ LOĜEJOJ ĈE KONGRESOJ

Unu el la plej ĝuindaj spertoj dum la Brita Kongreso en Bristol estis, laŭ la opinio de 60 partoprenintoj, la komuna loĝejo.

Pro la grandaj malfacilaĵoj rilate loĝejojn kaj mangaĵojn la loka kongreskomitato tre kuraĝe entreprenis la gastigadon de pli ol 60 kongresanoj en komuna loĝejo. La rezulto estis granda sukceso. Jen do bona ideo por estontaj kongresoj, ĉu internaciaj, ĉu naciaj. Ni jam sciis, ke tiaj aranĝoj tre bone efikas dum la kunveno de T.J.O. Nun ni scias, ke ankaŭ por plenaĝuloj la ideo estas akceptinda.

La tuta aranĝo estis simila al granda junulgastejo. Ne necesas detale klarigi tion, ĉar tiuj gastejoj nun troviĝas en multaj landoj, kaj ilia populareco kreskas pli kaj pli. Ni konsideru la avantaĝojn de tia komuna loĝejo:—

(1) ĝi ebligas al multaj neriĉaj samideanoj partopreni en kongreso. Ĉiuj samideanoj sopiras al tio, sed ne ĉiuj disponas pri sufiĉe da mono.

(2) ju pli da partoprenantoj en niaj kongresoj, des pli la influo sur la publikon. En Bristol oni devis severe limigi la nombron de partoprenantoj pro manko de loĝejoj.

(3) ĉiuj en la komuna loĝejo vivas portempe en Esperantujo. Por komencantoj kaj nesertuloj tio donas okazojn por pli intense ekzerciĝi en la lingvo.

(4) ju pli da homoj diversnaciaj kune vivas, des pli bone por la tuta homaro. Dum ni mangas ni interŝanĝas travivaĵojn kaj opiniojn pri tio kaj ĉi tio, kaj lernas toleri unu la alian.

En Bristol la komunaj manĝoj estis okazoj por bonhumoraj ŝercoj, kaj ridado estas bona por la digestado. Kiam la loĝejestro pefis silenton dum li proponis al ni niajn deĵorojn ĉiu montris sin preta akcepti taskon senplende. Oni lernis kanti aŭ fajfi dum lavado de la potoj kaj balaado de la dormĉambro. Maljuna Franco kaj Pola soldato, kies litoj troviĝis apud la mia, esprimis grandan kontenton kaj plezuron pri la sperto en la komuna loĝejo.

Mi tre petas, pro la neriĉaj samideanoj, ke estontaj kongreskomitatoj serioze pri-konsideru la ĉi-supran aferon.

Fred Parker, Anglujo

RECENZOJ

* = akireblaj ĉe I.E.L.



Mi Serĉis Oron kaj Oleon sed trovis . . .
 El sveda orig. de David Flood trad. K. Gustafsson : Eldona Societo Esperanto :

132 p. broŝ. 20 × 13 cm. Prezo 6 sv. kr. (plus afranko kaj imposto).

Kun plezura antcipio mi eklegis ĉi tiun novan verkon, memorante pri la du antaŭirintaj—*La Fino kaj La Granda Aventuro*—en la sama serio. Mi diru tuj, ke ĉi tiu tria libro multe malsuperas la aliajn laŭ vidpunkto literatura kaj lingva. Espriminte tiun opinion, mi tamen povas diri, ke la verko donas interesajn priskribojn kiuj distras la leganton ĝis la fino. Ĉi tie ni havas kvazaŭ pecetojn de Jack London, Jan Welzl (*Tridek Jaroj en la Ora Nordo*) kaj aliaj aŭtoroj, kiuj skribis pri la aventura vivo sur la Nord-Amerika tereno. La aŭtobiografio portas nin malantaŭen en medion malaperintan kies priskriboj siatempe ravis la tutan civilizitan mondon, sed kiuj nun ŝajnas nur eĥo el la pasinteco. Dum tridek jaroj nin superŝutis tiuspecaj verkaj kaj ilia allogo malfortigis.

Laŭ objektiva vidpunkto la plej interesa parto de la verko estas la unua ĉapitro, en kiu la aŭtoro priskribas sian junaĝon en Vermlando kaj donas tre viglan kaj vivecan bildon de la ekonomiaj kaj politikaj tendencoj de tiu tempo. Laŭ mi tiu ĉapitro valoras la tutan ceteran parton de la verko, ĉar ĝi donas al la internacia legataro klaran bildon kaj komprenon pri la sociaj maljustaĵoj, kiu pelis tiom da Svedoj — kaj en aliaj lokoj, tiom da alinacianoj — for de la hejma tereno trans la Atlantikon al sopirata libereco. Ankaŭ en tiu ĉapitro la aŭtoro ŝajnas pli inspirita, skribante kun verve kaj fervoro pri la luktoj de la kamparanoj kaj laboristoj por emancipiĝo sur la kampo politika.

Unu vera gemo en tiu parto estas la rakonto pri la diskutado inter la socialdemokratoj pri tio, ĉu la malplimulto estas prava : . . . *en ekstra kunveno oni fine fiksis per imponiga plimulto, ke la malplimulto estas ĉiam prava!* Tie ankaŭ troviĝas du belaj metaforoj : . . . *kvankam la multjaraj ŝutas sian grizan cindron sur la fajron de nia junaĝo, kaj la oleo de la jaroj moderigis la ondantan maron de la vivo.* Tamen la idiotismo bruligos salon ĉe la bordo estas por mi nekomprenebla.

La lingvo ĝenerale estas simpla kaj klara, sed troviĝas tro da nebonaj uzadoj por tiel mallonga verko. Mi miras, ekzemple, ke post preskaŭ sesdek jaroj oni

ankoraŭ povas miskompreni la funkcion de la distribua partiklo *po*, kiun la aŭtoro kelkfoje erare uzas; ekzemple p. 19 *dek du horojn potage* anst. *po dek du horoj en ĉiu tago* aŭ tute simple *dekdŭ horojn ĉiutage*. Laŭ mi *anti* en la senco kontraŭ estas nenecesa prefikso, kaj *Paron da tagoj pli poste* mi *prenis trajnon* estas tre malaprobinda—*Du tagojn poste* mi *trafis trajnon*. Nenecesa estas la teknika vorto *stari* kelkfoje uzita kun la senco *komenci, ekiri*, kaj verŝajne la tradukinto sekvis tro laŭvorte la nacilingvan formon kiam li skribis *mastodonto* (= praelefanto!) por priskribi urson, p. 123. Kaj kial uzi tiel malbelan formon *multi-iun rakonton* kiam la senco klare estas *multajn rakontojn*?

Neologismoj nenecaj mi opinias : *slumkvartalo* (*kvartalaĉo*) p.2 ; *tonelo* (*tuno*) p.60 ; *netrejnita* (*nesperta*) p.68 ; *obskuro* (*krepusko, duonluno*) p.96 ; *spurto* (*ekveturo*) p.107, kaj la sencan de la vortoj *asorti* p.107, *konfetoj* p.107, kaj *supeo* p.107 mi povas nur divenprovi malgraŭ serĉo en pluraj vortaroj. La nova vorto *peĉblend*o (mineralo el kiu oni ekstraktas radiumon, angle *pitchblend*) ŝajnas al mi netaŭga ĉar la radikoj *peĉ* kaj *blend* jam havas difinitajn signifojn en la lingvo, neniel rilatajn al la substanco priskribita.

Supozeble tio kuŝas ekster la kampo de la recenzisto, sed efektive mi ne povas ne fari aludon pri la tre altaj kostoj de la svedaj libroj, kiuj komparas malfavore kun tiuj el aliaj eldonejoj. Esperantistoj ja ne ĉiuj estas riĉuloj!

Mason Stuttard

La Originoj de l' Protestantismo : de J. Tanuma-Tosio : eld. Int. Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando. Broŝ. 24 p., 1 resp. kup.

Interesa kaj dokumentita prezentado de faktoj kaj okazaĵoj pri la vivo de Martino Lutero kaj iuj liaj samtempuloj, kaj analizo de la kaŭzoj de la ribelo kontraŭ la aŭtoritato de la Papo, kun komentario pri la rezultatoj.

Oni devas admiri la honestecon, per kiu oni konfesas la mankojn de la tiutempa eklezio, kiuj verŝajne multe kontribuis al la Reformacio. La verkinto aparte emfazas, ke estis tio, kio instigis Luteron al ribelo, sed ne la indulgencoj de Papo Leono X. Laŭ li, Lutero jam malkaŝe spitis la aŭtoritaton antaŭ ol la indulgenco estis farita.

Lingvo, presoj kaj papero bonaj.

M.S.

Une Humanité, Une Langue de S. Glodeau; eld. SAT-Amikaro, Paris: 12.5 × 19.5 cm., prezo 25 fr. fr. broŝ. 72 p.

Jen propaganda broŝuro, kie sub tre familiaraj rubrikoj la aŭtorino, alcelante la inteligentan kaj penseman "eksterulon", pritraktas la bone konatajn argumentojn por Esperanto. La vojo estas ja firme piedpremita, kaj oni ne serĉu tie ion originalan. Tamen la enhavo taŭgos por ĝenerala disdono inter Franc-parolantoj.

Ĉe ĉiu stadio de la argumentado, Simone Glodeau montras sin kompetenta dialektisto, kaj lerte kaj plaĉe kondukas la leganton tra la ĉapitraro. Ĉiu ĉapitro enhavas klaran resumon de faktoj kaj principoj tre efikan por konvinki ne-Esperantiston pri la logikeco kaj urĝeco de "nia afero". Ne la malplej alloga tiurilate estas la ĉapitro titolita *Konstruo de Esperanto*. Ĉi tie oni bonege ilustras la genian sistemon de la lingvo, utiligante precipe la Francan, kiu provizas aparte taŭgan materialon por komparado. Mi citu tri ekzemplojn:

(1) La Francoj jam konas proksimume milion el la 2842 radikoj, kiujn enhavas la *Universala Vortaro*.

(2) Franclingve, por montri ies metion, oni uzas la sufiksojn: *ier* (*épicier*); *eur* (*instituteur*); *ien* (*pharmacien*); *iste* (*dentiste*); *re* (*peintre, chantre*); cetero ĉi tiuj sufiksoj ofte havas plurajn aliajn signifojn, el kio rezultas, ke fremdulo faranta tro fruan ĝeneraligon konkludas, ke *chantier* (*ŝipkonstruejo*) signifas *kantisto*, ke *légumier* (*legomujo*) signifas *legomisto*, kaj ke *dentier* (*dentaro*) signifas *dentisto*.

(3) La Franca lingvo posedas la rekordon per siaj 2265 finaĵoj por verboj, kompare kun la 12 Esperantaj finaĵoj egale efikaj kaj rapide lerneblaj.

Ni esperas, ke la Francoj grandskale utiligos ĉi tiun senrezerve rekomendindan propagandilon.

E. G. Lock

La "Fulmo" Ĉiamdaŭra Kalendaro: 25 × 18.5 cm. de V. T. Inglis. Prezo nemontrita: papero bona, sed apenaŭ ĉiamdaŭra.

Ĝi donas la daton por ĉiuj jaroj post Kristo, sed ĉar oni ne traktas detale la ŝanĝon de la *Julia* kalendaro al la *Gregoria* en la diversaj landoj, ĝi ne validas dum la 17a jarcento por multaj landoj, kaj por unu-du esceptaj landoj eĉ pli poste. Cetero ĝi estas ĝusta.

T. Pendlebury

L'Art du Négoce (La Vendoarto) de Charles Touzot. Eld. ĉe Sève, Lyon, Francujo; franclingve. Prezo 150 fr. fr. broŝ.

Literaturo, moralo, estetiko! Jen necesajoj laŭ S-ro Touzot, por ĉiu serioza vendado de varoj. Tamen li tute ne forgesas praktikajn konsilojn pri la uzado de butikoj kaj ĵurnaloj, kaj la psikologiaj interrilatoj de kliento kaj vendisto. Tre interesan ĉapitron la aŭtoro verkis pri la utilego de taŭga internacia helplingvo; post longa sperto ĉe la Foiro de Lyon, li senhezite elektas tiucele Esperanton; fervoraj Esperantistoj tie trovos utilajn propagand-informilojn.

Se oni scilegas francan lingvon, deziras lerni aŭ plibonigi la vendoarton, aĉetu kaj legu ĉi tiun okulplaĉan bonstilan inform-plenan libron. Ĝi meritas sukceson.

Alfred G. Tucker

Rimarkigo: *Ocidenta Virginio* recenzita en Maja numero, estas havebla, kune kun ilustrita landkarto, kontraŭ 1 resp. kupono por sendkosto.

Propagandan ilustritan poŝtkarton kun vorto *Esperanto* grandlitere trans mapo de la terglobo ni ricevis de Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Prezo 50 fr. fr. por 10 kartoj.

Vindiana: franclingva traktato pri pralingvo, de P. Stojan, L.K. 2 respondkuponoj ĉe Esperanto, Arras, Francujo.

LA NOKTUO

En la fundo de la valo,
la rajdanto sur ĉevalo,
sur vojeto malfacila,
iris sola kaj trankvila.
De l' torento kiu fluis
tie, akvofalo bruis.
Nigraj nuboj flirtis alte,
kuris sur ĉiel' senhalte.
Eknoktiĝis kaj noktuo
flugis el la arbotruo,
kriis per funebraj vokoj
inter la mallumaj rokoj.
Ĉar la birdo tiel ĝemis,
ambaŭ pro timeg' ektemis;
la rajdanto kaj ĉevalo,
en la fundo de la valo.

Luciano Thévenin, Francujo

KELKAJ TEORIOJ PRI VERSTRADUKADO

Ĝis nun la plejparto de Esperanta poezio ne atingis al tiu literature alta nivelo, kiun jam atingis tie kaj tie nia Esperanta prozo; kaj el ĉiuj Esperantaj poemoj la originalaj estas pli indaj, ol la tradukitaj.

Tio rezultas el la fakto, ke Esperanto estas *ina* lingvo; tio estas, lingvo kies vortoj plejparte finiĝas per senakcenta silabo. Pro tio, ia provo reteni en Esperanto la originalajn jambojn (—), nepre perfortas al la interna genio de la lingvo. Tia provo kondukas nur al tiu trouzo de elizio, kiu makulas la paĝon per apostrofoj, malklarigas la senco, kaj mortigas ian ajn belecon, kian la originala verko enhavis. Mi kredas, ke (krom eble ĉe kantoj) tiu blinda firmtenado al originalaj jamboj estas tute nenecesa. Kiel Brito, mi citas el la angla lingvo; sed mi estas certa, ke oni povas apliki miajn komentojn al multaj aliaj lingvoj, aparte al tiuj, kiuj ne estas *inaj*.

Pripensu ekzemple, la jenan version el *Morte d' Arthur* de Alfred Lord Tennyson:

And God fulfilled himself in many ways

Se oni forprenas de la komenco de la verso la senakcentan *and* kaj almetas ĝin al la fino, la jamboj fariĝas trokeoj (—), tiel:—

God fulfilled himself in many ways, and

Kompreneble, verkante en trokeoj, oni elektas kiel eble plej ofte trokeajn vortojn; kaj mi ne volas diri, ke la tradukanto devas tiamaniere transloki ian vorton. Mi deziras nur montri la neeviteblan similecon inter la angla (aŭ alilingva) jambo kaj la Esperanta trokeo. Ili malsimilas nur ĉe la komenco kaj fino de verso; kaj ĉar la komenco kaj fino de verso estas ofte neregulaj en ambaŭ lingvoj, la diferenco estas ankoraŭ des malpli. Per simila procedo, oni povas ŝanĝi la daktilon (—) kaj la anapeston (—) per amfibrako (—), kiu estas eble la plej facile uzbla ritmo en Esperanto.

Por provi tiun teorion, mi elektis hazarde la jenajn jambajn pentametrojn el la *Sailing of the Argo* (*Ekveliro de la Argo*), de Wm. Morris:—

But on they went, and as the way they trod,

His swelling heart nigh made each man a god,

While clashed their armour to the minstrelsy

That went before them to the doubtful sea.

Tion mi improvize tradukis laŭ trokeaj pentametroj (aŭ tion mi kredis), jene:—

Sed en ili sur la longa vojo

Svelis ĉiu koro pro dieca ĝojo,

Kaj armaĵo sonis ĝis la maro

Post konduka menestrala* aro.

*Trubadura

Du interesaj faktoj tuj fariĝis evidentaj. Unue, tre malfacile estis, kunpreni la enhavon de la angla pentametro en la limon de la Esperanta pentametro. Efektive, oni preskaŭ ne povas diri, ke mi sukcesis. Due, la Esperantaj pentametroj aspektis kaj sonis multe pli mallongaj, ol la anglaj, kaj la tuto posedis tute malsaman econ. Nur la dua verso ŝajnis kontentiga; sed kiam mi ree esploris ĝin, mi trovis, ke ĝi estas ne pentametro, sed heksametro! Eksperimente, do, mi verkis la tuton laŭ heksametroj, kun la jena rezulto:—

Sed antaŭen ili iris; sur la vojo

Ĉiu koro svelis pro dieca ĝojo;

Kaj armaĵoj, post la menestrala aro,

Kunsonoris ĝis la nefidinda maro.

Kia plibonigo! Ĉiu detalo en la originalo trovas naturan lokon en la tradukaĵo, eĉ tiu ĝenema vorto *doubtful*; kaj la rimo *aro-mar* revenas per si en logikan sinsekvon. Plue, la versoj nun posedas iom de la ĝenerala eco kaj digno de la originalo.

Ioman tempon mi cerbumadis pri tiu fenomenon, kaj fine mi trovis la klarigon. En la angla lingvo, la senakcentaj silaboj estas plejofte apartaj vortoj, ĉiu kontribuante al la penso de la verso; en Esperanto ili estas plejofte vortfinajoj, kiuj eble helpas al la kompreno, sed aldonas nenion al la penso-substanco. Pro tio estas, ke oni tiom malfacile esprimas per Esperanta pentametro la enhavon de angla pentametro.

Plue, kvankam la senakcentaj anglaj vortoj aŭ silaboj ofte komenciĝas per konsonanto, la Esperantaj vortfinajoj ĉiuj komenciĝas per vokalo. Tio rezultas al malrapidiĝo ĉe la ritmo de la angla verso, kaj plirapidiĝo ĉe tiu de la Esperanta.

La ekstra ritmo de la Esperanta heksametro kompensas ambaŭ mankojn, tiun de substanco kaj tiun de ritmo.

Tial mi alvenis al du gravaj principoj rilate al la tradukado de anglaj (kaj kredeble de alilingvaj) versoj en Esperanton:—

(1) Anstataŭigi jambojn per trokeoj, daktilojn kaj anapestojn per amfibrakoj.

(2) Anstataŭigi pentametrojn per heksametroj.

Por provi miajn teoriojn, mi tradukis entute la *Morte d'Arthur*, de Tennyson, laŭ trokeaj heksametroj, kun tre malmulte da malfacileco, kaj kun tia sukceso, kian espereble la leganto iam povos juĝi por si. Dume, mi citas kelkajn versojn, kiujn la angla leganto povos kompari kun la originalaj, kaj pri kiuj la alilingvano eble volos esprimi opiniojn. (Tiom mi alte taksos). Oni ĵus prenis la vunditan kaj

mortantan reĝon en reĝan boaton, kaj lin adiaŭas Sir Bedivér, la lasta el la Kavaliroj de la Ronda Tablo :—

Tiam laŭte kriis Bediver,
 "Arturo mia lordo, kien nun mi iros ?
 Kie kaŝos miajn frunton kaj okulojn ?
 Mortis jam la veraj kaj antaŭaj tempoj,
 Kiam ĉiu tago portis noblan ŝancon
 Kaj ĉiu ŝanco naskis noblan kavaliron.
 Ne estis tiaj tempoj, de post kiam lumo
 Gvidis la Saĝulojn la mirhdonaco.
 Sed nun disigiĝis tute tia Ronda Tablo,
 Tiu spegularo de potenca mondo ;
 Kaj mi, la lasta, iros for sen sammoranoj,
 La tagoj senlumiĝos kaj la jaroj pasos
 Inter novaj homoj, nekonataj mensoj."
 Arturo penrespondis el la reĝboato :
 "La antaŭa moro cedas al la nova,
 Kaj Dio sin plenumas per diversaj faroj,
 Por ke unu bona moro ne tiranu.
 Vin konsolu : kiel mi konsolon donus ?
 Vivon mi travivis ; kion do mi faris,
 Dio mem purigu ! Tamen se neniam
 Vi revidus min, por la animo preĝu :
 Plimulto estas elfarita per la preĝo
 Ol la mondo eĉ imagas. Por mi, tial,
 Voĉon kiel fonton levu tage, nokte.
 Kia estas homo krom la stulta ŝafo,
 Kiu nutras blindan vivon en la cerbo
 Se, konante Dion, li ne levas manojn
 Preĝe, kaj por si kaj por aliaj, kiuj
 Nomas lin amiko ? Jen la tuta tero
 Ĉiel alligiĝas ĉe la Di-piedo."

Longtempon staris Bedivér, rememorante,
 Ĝis la ŝipo faris kontraŭ matenruĝo
 Nigran punkton, kaj la lamentado mortis.

Poste, mi turnis min al la usona poemo *Hiawatha*, de Longfellow ; poemo kies trokeaj tetrametroj delonge ŝajnis al mi neordinare taŭgaj por tradukiĝo en Esperanton. Sed tetrametro estas po unu ritmero malpli longa ol pentametro ; tial, kvankam la diferenco en ritmo inter angla pentametro kaj Esperanta heksametro estas preskaŭ nerimarkebla, nur la diferenco inter 10 kaj 12 silaboj, tiu inter angla tetrametro kaj Esperanta pentametro (tio estas, la diferenco inter 8 kaj 10 silaboj) devus esti pli sentebla. Pro tio, mi decidis, ke mi uzos la originalajn tetrametrojn. Baldaŭ mi trovis ke la diferenco en ritmo inter la du lingvoj estas nemulta, kvankam la Esperantaj versoj iom post iom sendube emas galopi. La ĉefa malfacilaĵo troviĝis kiam mi penis muldi la substancon de la anglaj tetrametroj en la formon de Esperantaj tetrametroj. Multfoje mi trovis tion ne ebla, ekzemple ĉe la versoj :—

Showed the broad white road in heaven.

Eve in sleep I close my eyelids.

Saw the moon rise from the water.

La tradukado estis facila nur kiam mi povis anstataŭigi la anglajn vortojn per egale mallongaj Esperantaj vortoj, ekzemple ĉe la versoj :—

Do not shoot us, Hiawatha.

Ne nin pafu, Hiawata.

Sat erect upon his haunches.

Sidis rekte sur la koksoj.

Ĝenerale, mi verkis tetrametron nur ellasinte ion de la originalo, jene :—

Bright before it beat the water.

Kaj antaŭe ondis akvo.

(Rimarkeble pli rapida)

Pentametro : *Kaj antaŭe ondis hela akvo.*
 (Iom pli longa)

Learned of every bird its language.

Lernis lingvojn de la birdoj.

(Tetrametro)

Lernis de la birdoj ĉies lingvon.

(Pentametro. Nepre pli trafa, laŭ tempo kaj substanco, ĉu ne ?)

Aliflanke, iuj versoj, kiel ekzemple, *Do not shoot us, Hiawatha*, kaj *Hiawatha aimed an arrow* ne povis pleniĝi Esperantan pentametron sen plua vorto.

La vorto *Nokomis* proponis necedeman malfacilaĵon, ĉiam postulante antaŭan unusilabon. Komprenibile, mi povis faciligi la aferon per elizio ; sed elizio mi ne toleras, krom ĉe *l'*. Tiel facile evitante la problemon, ni neniam ellernos la principojn de verstradukado en Esperanton.

Mi citas kelkajn versojn el mia peno traduki *Hiawatha* laŭ tetrametroj :

Kaj instruis lin Nokomis

Pri la steloj en ĉielo,

Montris Iŝka-du, kometon,

Iŝka-du kun fajr-rubandoj ;

Mortodancon de spiritoj

Kun la plumoj kaj batiloj

For en nordo ekflagrantaj ;

Blankan vojon sur ĉielo,

Vojon ombran kaj fantoman,

Transirantan la ĉielon,

Ombre kaj fantome densan.

La supra traduko, obeante al la originala ritmo, eble estos tolerebla al tiuj, kiuj scias aŭ konas la originalon ; sed mia opinio, la troa kunpremiĝo, la eka tempo, kaj la multaj ellasitaĵoj, vekos malaprobon ĉe la alilingvanoj.

Pro tio, mi faris eble impertinentan eksperimenton, kaj tradukis ĝin laŭ Esperantaj pentametroj. Mi kredas, ke tion farinte, mi pli ĝuste trafis la esencon de la poemo ; kaj mi permesas al mi sugesti, ke—krom tie kaj tie—la ĝenerala entuta impresado de la pentametroj ne tre rimarkeble malsimilas al tio de la anglaj tetrametroj.

Preter ĉio, la celo de tradukanto estas ebligi al la alilingvano, la legadon de lia literaturo ; kaj el tio, plej gravas la

substanco kaj la esprim-maniero. Ĉar la alilingvano ne povas legi la originalon (se jes, li ne bezonas la tradukon), ne multe interesas lin ties ritmo, kiu povas esti io tute fremda al la propra lingvo. Sed nepe interesas al li la ritmo kaj kompreneble de la Esperanto. La traduko de nacia poemo en Esperanton devas rezulti je *Esperanta poemo en st.* La tradukanto devas konsciencie firmenigi al la substanco kaj figuroj de la originalo, sed li devas konformigi la teknikon al la nova medio.

Mi citas kelkajn versojn el mia pentametra traduko de *Hiawata* :

Li atendis ĝis la cervoj venis,
Ĝis li vidis du kornarojn supre,
Du okulojn tra la kreskajaro.
Du naztruojn flari kontraŭvente ;
Kaj la cervo venis laŭ la vojo,
Lume makulita inter ombroj ;
Kaj en li la koro ekscitiĝis,
Tremis kiel la folioj supre,
Kiel la betulfolioj tremis
Dum la cervo venis laŭ la vojo.
Tiam sur genuon levigante,
Hiawata cele tiris sagon :
Nek branceton lia faro movis,
Nek folio flirtis aŭ susuris,
Sed la vigla kapreolo aŭdis,
Batis per la kvar piedoj kune,
Levis unu hufon kaj aŭskultis,
Saltis renkontiĝe al la sago ;
Ha, zumanta, sortoplena sago,
Kvazaŭ vespo zumis ĝi kaj pikis :
Morta kuŝis li en la arbaro,
Ĉe la transirejo de l' rivero ;
Jam ne batis la timema koro,
Sed la koro nun de Hiawata
Ege pulsis, kriis kaj triumfis,
Kiam li la cervon portis hejmen,
Kaj lagu kaj Nokomis kune
Lin salutis kaj aplaŭdis lin.

Fine mi invitas al alilingvanaj verkemuloj, ke ili eksperimente traduku Esperanten elĉerpaĵojn el la propra literaturo, laŭ la teorioj supresternitaj ; kaj tre plaĉus al mi ricevi korespondadojn tiurilate de ĉiu, kiu strebas al pli alta nivelo ĉe Esperanta poezio. Ke mi eble ne komprenos la lingvon kiun ili tradukas, des pli interesos min.

La amo al poezio bedaŭrinde mankas en la hodiaŭa mondo. Eble tio rezultas el la fakto, ke la lingvoj estas jam maljunaj, kaj ili estas la esprimiloj de tiom da ĉiutagaj banalajoj. Sed Esperanto estas juna lingvo, lingvo kiun ankoraŭ oni ofte legas nur por ĝui la belan sonon. Kaj por tiu celo ni bezonas poezion. Tradukante, ni lernas ; lerninte, ni verkos originale ; inde verkinte, ni senmortigos Esperanton. Nobla literaturo estos nia asekuro kontraŭ nuliĝo.

Brendon Clark, Nov-Zelando

LIBROJ EL SVEDUJO

Bonvolu noti, ke pro la ŝanĝo en la sveda kurzo la jenaj prezoj nun validas anstataŭ tiuj montritaj en la Jarlibro, paĝoj 180-184 :

	ŝ.	p.
Al Torento	2	3
Barbro kaj Eriko	1	2
Bengalaj Fabeloj	1	2
Dialogoj kaj Komedietoj	1	0
Dua Rapsodio	3	6
La Esperanto-Klubo	1	2
La Fino	5	3
Gösta Berling	13	0
La Granda Aventuro	12	0
Hasse Z., Novelaro	3	6
Hindo rigardas Svedlandon	6	0
Homaj Rasoj de la Mondo (nur broŝ)	5	3
Infanoj de Betlehem	1	6
Infanoj en Torento	4	6
Kudlago	1	4
Kvindek Jaroj kun Paul Nylen	3	6
Per kio ni amuzu nin ?	1	2
Ringo de la Generalo	3	6
Sveda Antologio	17	6
Tra Sovaga Kamĉatko	8	9
Tria Rapsodio	3	6

LA STATUOJ

Statuoj dormas
sur muroj de l' ĝarden' ;
sur ili verdas
muskajoj kaj liken' ;
kaj nokte kiam
en grizo kantas gril',
la lun' al ili
liveras kisojn mil.
Sed la statuoj
plu dormas kaj plu mutas,
kaj nur la horoj
sin preter ilin ŝutas . . .

Karolo Piĉ, Ĉeĥoslovakujo

VINTRA URAGANO

Frosturagan' ciklonas
Tra vintra nudĝarden'.
En mia brust' demonas
Brulanta amvenen'.
Tra l' muĝo de l' senbrida
Fanfaro de la vent'
Singultas larmavida,
Siblanta amlament'.
La nuboj neĝon ŝutas,
Kovrigas sulk' kaj voj'.
Sub neĝ' sufokbalbutas
Junaĝa mia ĝoj'.

Lucien Laurat, Francujo

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	19.00–19.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 25.34m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	17.50	Sofia (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj Radiostacio, Moravska Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	18.05	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	17.50	Sofia. (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	19.45–20.00	EAJ 14 (Hispanujo). Radio Castellón. 200m. Kurso de S-ro F. Rivelles.
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	20.50–21.00	Moravska Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
Sabato	18.30-18.45(?)3	SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazilo vivo. "Brazilo Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Brita somera tempo oni aldonu unu horon, kaj por Mez-Eŭropa somera tempo du horojn, sed notu ke pro la enkonduko aŭ ne-enkonduko de somera tempo en diversaj landoj ni ne povas esti certaj pri la ĝusteco de ĉi tiu rimarko. Ni urĝe petas informon pri necesaj aliĝoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulletojn kaj informojn pri ricevado.

OKAZAS NENIO

Facila legolibro
originale verkita en Esperanto de **CHR. HOUGAARD.**

Prezo 2 ŝil., afranko 2p. (9 respondkuponoj)

Mendu ĉe I.E.L.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 184

OFICIALA INFORMILO

6an Julio, 1946

NOVAJ DELEGITOJ

Argentino

Goya. D: Pastro B. Ostropolski, Casa Parroquial, str. Mariano I, Loza 647. Tel: 463.

Rosario. VD: A. F. A. Mántica, str. Corrientes 439.

Aŭstralio

Melbourne. FD (Junulaferoj): F. Halls, 59 Pt. Nepean Road, Elsternwick, S.4.

Sidney. FD (Arto; Instruado; Naturscienco): W. Chandler, 57 Northcote St., Crow's Nest.

Belgujo

Kortrijk. D: R. Van Fleteren, De Haernelaan 17.

Britujo

Anglesey. D: Pastro J. Pierce, Bron Dinas, Marian Glas, Anglesey, N. Kimrujo.

London, E.18. VD: E. Willcocks, "Eastholme", Lansdowne Road. Tel: WANstead 5259.

London, N.19. VD: K. McLennan, 102 Hazelville Road.

Manchester. FD (Telefonio): E. Revill, 24 Welby St., Manchester 13.

Sunderland. D: G. Moir, 44 Francis St., Fulwell.

FD (Brosfarado): T. E. Cottam, 3 Riversdale Terrace.

FD (Instruado; Lingvoj): La D.

Ĉeĥoslovakujo

Brno. VD: Jan Geryk, Titova 8.

FD (Filatelo): S. Sedlák, U strojirny 18, Brno-Židenice.

FD (Komerco): R. Necas, U strojirny 20, Brno-Židenice.

FD (Muziko; Arto): La VD.

FD (Pentro-arto; Desegnado): O. Petr, Lesní 17, Brno-Nový Lískovec.

FD (Skoltismo; Turismo): O. Kocian, Hutterova 3b.

FD (Studentaj aferoj): M. Ružička, Kotlárská 12.

FD (Virinaj aferoj): S-ino M. Adamcová, Lidická 79.

Mladá Boleslav. D: Prof. J. Koženy, Mladá Boleslav II-379. Tel: 204.

Praha. D: J. Šustr, Benediktská 11, Praha I. Tel: 618-75.

FD (Filatelo): H. H. Khel, Pivonková 2124, Praha XIII/75.

FD (Skoltismo): F. Buhr, Bělohorská 187/514, Praha XVIII. Tel: 33041.

Pržno. D: T. Machala, Pržno nr. 33, pošto Jablunka nad Bečvon.

Tyn n. Vltavou. D: J. E. Slávek, M. Str. č.řp.233.

Danujo

Svallerup. D: J. Hamalainen, Svallerup-Kalundborg.

Veje. FD (Haven-aferoj): C. Nielsen, Fjordgade 16. Tel: 217.

FD (Turismo; Migrado): A. Jensen, Fredericiavej 8-Møhlholm.

Egiptujo

Alexandria. FD (Turismo): F-ino L. Schmidova, 3 Str. Caied Gohar.

Finnlando

Lappeenranta. VD: W. Tossavainen, Perillistenkatu 10.

Franca Ekvatora Afriko

Brazzaville. D: F. Knecht, mété, Brazzaville, Moyen-Congo. Tel: Plateau 43.

Francoj

Carcassonne (Aude). D: A. Paloux, 94 Rue Voltaire.

Gaillac (Tarn). D: F. Cortés, Boulevard Gambetta 51.

Golfe Juan (A.M.). D: S-ino F. Bronne, Chemin des Courcettes, (La Pertuade).

Lannemezan (H.P.). D: A. Bourguignon, Rue Voltaire. Tel: 69.

Narbonne (Aude). D: B. Constans, 4 Rue du Genie.

Orleans (Loiret). D: F-ino A. Thibault, 13 Rue de la Lionne.

Paris. FD (Filozofio Bhagavad-Gita, Vedanta Advajta): P. Hubert, 45 Rue Douai, Paris IX. Tel: TRI 44.00.

FD (Juro): G. Dronchat, 44 Rue des Ecoles. Tel: ODEon 44.88.

Quimper (Finistère): D: C. Le Séac'h, Créach-Maria, Izella en Loc-Maria.

Hispanujo

Barcelona. D: Prof. D. Dalmau, str. Roger de Lauria 98. Tel: 75358.

Hungarujo

Budapest. FD (Komerco; Turismo): F-ino S. John, Dessewffy-u.24, Budapest VI.

Hodmezövásárhely. D: H. Imre, Száz u. 9.

Mako. D: S. Kemény, Dessewffy tér 17. FD (Abelkulturo): La D.

Islando

Stykkisholmur. D: Jóhann Rafnsson.

Jugoslavujo

- Beograd.** D: M. Erić, Nevesinjska str. 16-1, Beograd VIII.
Bjelevar. D: V. Polašek, Zrinjskoga ul. 7. VD: D. Štokić, Nazarová ul. 4.
Dubrovnik. D: A. Kiridžija, Kotarska zadruga. Tel: 205.
Novisad. D: J. Vécsey, Ulica Jugoslovenska Armije-112. FD (Komerco; Vitrajmetio): La D.
Semeljci. FD (Agronomio): T. Gregurek, p. Semeljci (Slavonie).
Sevnica. D: A. Perc, Sevnica N-ro 72.
Slav. Požega. D: D-ro Ž. Vugrinec, Vučjak 21.

Kanado

- Ste. Anne de Bellevue (Quebec):** D: J. V. Lawson, 39 b Montée Ste. Marie.
Picton (Ontario). D: Hugo Gerisch, R.R.4.

Maroko

- Casablanca.** FD (Stenografio; Virinaj aferoj): F-ino Y. Leal, 158 Avenue Mers Sultan.
Ras el Arba. D: F. V. Mathias, Ras el-Arba par Zifrite. Tel: 4. FD (Agrikulturo): La D.

Nederlando

- Hengelo.** D: G. Van Heek, Geerdinksweg 58.
Hoorn. D: J. Smit, J. Pz. Coenstraat 13,
Nieuwe Niedorp. D: F-ino A. Spaans, Nieuwe Niedorp B 94.
Nijmegen. D: L. J. Wulfers, Dobblermanweg 48. FD (Katolikismo): La D.
Wageningen. FD (Agrikulturo): C. de Jonge, Westerhofsepad 23.

Norvegujo

- Levanger.** D: R. W. Hagen, Hakon den godes gate 19.

Rumanujo

- Cluj.** D: D-ro K. Mocsy, Str. Motilor 16.

Svisujo

- Langenthal.** D: F-ino L. Schaerer, Schorenstrasse 32.

Usono

- Bremerton (Wash.)** D: D. Bushaw, 1542 8th St. Tel: 1287-W.
Caledonia (N.Y.). D: H. E. Latham, 14 Hanbro Park. Tel: 21-L-5.
Kewanee (Ill.). D: J. Gamble, R.R.2.
Prairie Farm (Wis.). D: J. Oliver Lillevoid, Route 2.
Rockville Centre (N.Y.). D: O. Allen, 74 Liberty Avenue. Tel: 342-J.

ŜANĜOJ

Argentino

- Rosario.** FD (Industrio; Komerco): vakas pro morto de S-ro Cupé.

Britujo

- London, N.W.7.** VD: vakas pro translokigo.

- Romiley.** D: vakas pro morto.

- Woodley.** D: vakas pro morto.

Franclujo

- Limoges.** D: nova adreso; Laboratoire Départemental, Ancien Evéché.

Nederlando

- Oosterend.** D: vakas pro translokigo.

- Den Haag.** FD (Impostaj aferoj): vakas pro translokigo.

- Wageningen.** VD: nova adreso: Zoomweg 10.

Polujo

- Walbrzych.** D: nova adreso: skr. poczt. 34.

Usono

- Santa Monica (Cal.).** D: nova adreso: 1137 Second St.

MEMBRO-SUBTENANTOJ

239. S-ro W. S. Ryan, Worksop, Anglujo.
 240. S-ro M. Reháč, Labská Bouda, Ĉeĥoslovakujo.
 241. S-ro T. Balda, Praha, Ĉeĥoslovakujo.
 242. S-ro D. W. Gibson, Seattle, Wash., Usono.
 243. S-ro W. P. Vathis, Mauch Chunk, Penn., Usono.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Junio, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Junio 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	3036	5379
Individuaj Membroj:		
MJ	696	908
MA	1509	3747
MS	121	243
Patronoj ..	22	24
DM	75	94
HM	12	20
	2435	5036
	5471	10415

Korespondadoj en Junio 1946:

Ricevitaj ..	775
Senditaj ..	4467
	5242

DONACOJ por helpi al la forigo de la defcito:—F-ino K. Wood 10s., S-ino D. Dawn 5s., G. A. Hartley 5s., S-ino M. E. Eagling 2s., W. T. 1s., T. J. Gueritte 8s. 6p., Oldham Co-op Virina Gildo 5s., S. Zamir 3s., R. Hamilton 1s. 6p., T. J. Gueritte 2s. 4p., J. Course (Royston) 5s., H. E. Latham 5s., D. W. Gibson 10s.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo: R. Scott 18s., F. C. Rudman 42s., G. M. Hayton 7s. 6p., A. G. Tucker 5s., J. R. Salter 40s., S-ino M. C. Gillett 10s., Ge-sroj H. Reed 5s., P. J. Cameron 2s. 6p., W. T. Head 5s., T. E. Collier 2s. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

EDZIĜO

Arnadóttir—Bödvarsson—Je la 19a Junio 1946, F-ino Agusta Arnadóttir kaj Arni Bödvarsson, del. de IEL en Rangárvöllum, Islando.

Lapierre—Legris—Je 6 Julio en La Varenne, Marcel Lapierre kun Renée Legris, ambaŭ samideanoj. Nova adreso: 79 Avenue Joffre, Saint-Maur (Seine), Francujo.

MORTOJ

Cupé—Je la 15a Aprilo mortis nia VD en Rosario, Argentino, S-ro Jorge Cupé. Vicprezidanto de la loka grupo, li fervore laboris por la movado dum kelkaj jaroj.

Currie—Jus forpasis post iom longa malsano S-ro W. B. Currie, nia Delegito en Woodley kaj Romiley, Anglujo. Li estis Honora Membro de IEL, dum multaj jaroj Prezidanto de la Lancashire kaj Cheshire Federacio kaj de la Grupo en Burnley. Li estis inter la plej viglaj propagandistoj en Britujo.

Hailstone—Je 5a de Julio en Coventry, Anglujo, S-ino W. E. Hailstone post mallonga malsano. Ŝi Esperanistĝis en 1908, kaj agadis multajn jarojn kiel Delegito en Coventry.

West—Je la 8a de Julio mortis S-ro John B. West, dum multaj jaroj Delegito en Margate, Anglujo.

KATOLIKA OPINIO PRI "D-ro DORNER"

El la vidpunkto de la Ĝenerala Moraljuro kaj de la Katolika Moralo, la verko de H. L. Egerrup estas malbona libro.

En tre alloga, preskaŭ romantika maniero, kun danĝera propagandefiko, la aŭtoro defendas kiel tre naturajn kaj legitimajn tezojn, la plej abomenindajn praktikojn.

La verkinto pardonu al ni, se ni diras ke lia libro memorigas nin pri la plej hontinda nazisocialista literaturo.

La libro estas ne nur malmorala, ĝi estas preskaŭ sendia, kaj iuj esprimoj insultas la honoron de Dio. Se la aŭtoro estas kredanto, li ja apartenas al la plej ekstrema liberala skolo, por kiu Dio estas la nobla ekzilulo, forpelita el la homa socio. Praktike lia libro estas materialisma-ateisma verko.

Liaj praktikaj vivprincipoj ŝajnas esti: (1) ĝui kaj fari ĝuoplenajn homojn, (2) la celo pravigas la rimedojn.

Estas nobla celo plibonigi la homan rason. Ankaŭ ni alcelas tiun idealon. Sed ni konceptas ĝin alia ol H.L.E. La korpa valoro de la homo estas, laŭ ni, nek la sola, nek la plej alta homa valoro. La celo de la korpa valoro certe estas posedi pli belan materian vivoforton, sed ankaŭ kaj precipe, doni al la specife homaj valoroj—nome la spiritaj kaj moralaj fortoj—pli lertan kunlaboranton.

Ni ne volas plibonigi la homrason sur la sama bazo kiel ĉeval- aŭ bovrason.

Lia idealo de mondpacko, realigota per internacia arta prostituado kaj adulto, estas absurdaĵo. Kiel paco povus estiĝi en socio naskita el la senhonorigo de la morala homo?

Lia militarisma entuziasmo por bredado de soldatoj en sia homkulturejo ŝajnas al ni malbone akordi kun lia klopodo por realigo de internacia paco! Olivbranĉo kaj pafilo kreskas en la sama arbaro de tiu laŭdire savanta doktrino!

En la homo H.L.E. ankoraŭ nenion alian malkovris ekster la besto. Ni bedaŭras tiun malfruigon. Kiel homo ni juĝas la libron maldigna; kiel katoliko ni opinias ĝin maskite obscena.

*Flandralingve verkita de kanonika moŝto
V. Heylen, laŭ peto de la tradukinto
J. de Maeyer, Nivelles, Belgujo*

Dezirata korespondi tutmonde, interŝanĝi poŝmarkojn, poŝkartojn, broŝurojn, gazetojn. Certe respondos. S-ro Antonio Cadima, Porto do Lobito, Angolo, Port. Okcidenta Afriko.

Ernesto Schlesinger, str. Regina Maria 22, Cluj, Rumanujo, serĉas korespondantojn seriozajn (komercistoj, fabrikistoj, ĵurnalistoj) en ĉiuj landoj. Interŝanĝas pm.

Mi dezirata korespondi kun samideanoj en Italujo, Hispanujo, Bretonujo, Sud-Ameriko kaj Centra Ameriko. Tuj respondos. D-ro J. Moss, Resident's Dining Room, General Hospital, Birmingham 4, Anglujo.

Korespondado dezirata en norvego aŭ dana lingvoj aŭ per poŝkartoj en Esperanto. Iver Svarstad, P.O. Box 1909, Long Beach, Calif., Usono.

SUPERA KURSO

diskutos mondproblemojn, kaj dezirata havi viajn opiniojn kaj tradukojn el viaj ĵurnaloj de kritikoj pri Brita agado k.t.p. kiel diskutotajojn. Nepre respondos la gekursanoj.

ESPERANTO-KURSO,

CITY LITERARY INSTITUTE,
Stukeley Street, London, W.C.2.
Anglujo.

BIBLIOTEKO DE LA FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ

Fontamara. I. Silone.

El Itala lingvo tradukis A. Anĝelo kaj J. Van Scheepen.

La Hispana Tragedio. Jef Last.

El la Nederlanda lingvo tradukis G. J. Degenkamp.

Homoj en milito. Andreas Latzko.

El la Germana lingvo tradukis Charles Minor.

Judoj sen mono. Michael Gold.

El la Angla originalo tradukis Georgo Saville.

Kulio. M. H. Székely-Lulofs.

El la Nederlanda lingvo tradukis P. J. Makkinje.

Patroj kaj Filoj. I. S. Turgenjev.

El la Rusa lingvo tradukis D-ro Kazimierz Bein (Kabe).

La Senlingvulo. Vladimir Korolenko.

El la Rusa lingvo tradukis Maria Ŝidlovskaĵa.

Taglaboristoj. Hans Kirk.

El Dana lingvo tradukis L. Friis kaj W. Jensen.

Bele presitaj kaj binditaj libroj.

Ĉiu libro 7 ŝilingoj, afranko 6p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ

anoncas

sian novan organon

Internacia Poŝtmarka Revuo

Tio ne estas nura bulteno aŭ informilo, sed vere unuaranga, bonkvalita fakrevuo verkita en Esperanta kaj Angla lingvoj.

Se vi deziras esti bone informita pri la filatelo, nepre abonu ĉi tiun valoran eldonaĵon. Aperas ĉiumonate en modela Esperanto.

Membroj de IAPK (jarkotizo 5 anglaj ŝilingoj) ricevas IPR sen plua pago. FARIĜU MEMBRO NUN.

Oni bonvenigos artikolojn en Esperanto pri la filatelo.

Ĉiuj informoj riceveblaj kontraŭ neuzita poŝtmarko de via lando ĉe la Organiza Sekretario de IAPK, S-ro P. H. Lewis, XPDO House, Didcot, Berks, Anglujo.

Por distra horo la plej taŭgaj libroj en Esperanto estas la "Epoko" libroj

La libroj enhavas interesajn, malenuigajn romanojn.

Preso klara—bindo kartona—papero bonkvalita.

1. **MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO.** Agatha Christie.
El la angla originalo tradukis "Etulo."
2. **La KNABOJ DE PAŬLO-STRATO.** F. Molnár.
El la hungara originalo tradukis L. Spierer.
3. **LA PRINCO KAJ BETTY.** P. G. Wodehouse.
El la angla originalo tradukis G. Badash.
4. **LA TEMPO-MAŜINO.** H. G. Wells.
El la angla originalo tradukis E. W. Amos.
5. **PRINCINO DE MARSO.** Edgar Rice Burroughs.
El la usona originalo tradukis K. R. C. Sturmer.
6. **COLOMBA.** Prosper Mérimée.
El la franca originalo tradukis Prof. J. Beau.

Prezo de ĉiu libro 1ŝ. 6p., afranko 3p.
La ses libroj kune por 7ŝ. 6p., afranko 7p.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LTD., ANGLUJO

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo